655.23 : 408.92

## PRI TIPOGRAFIO, EN RILATO KUN SUPERSIGNO-HAVAJ ESPERANTO-LITEROJ

**(A. Lienhardt, Mulhouse, Francio)**

Estas konate, ke literoj kun supersignoj ekzistas ne nur en Esperanto, sed ankaŭ en diversaj aliaj lingvoj, ekzemple en la slavaj, en la franca, kaj en aliaj.

Same estas konate, ke la supersigno-havaj literoj en Esperanto jam ofte estis celpunkto por kritikemuloj. Iuj kritikas, ja prave, ĉar multaj presejoj malhavas la koncernajn liter-tipojn, aŭ ne havas ilin en ĉiuj necesaj liter-kategorioj, kiam la teksto postulas ilin. Aliaj kritikas, ĉar — laŭ ili — la »beleco« de la presita teksto »suferas«, kiam aperas supersignoj aŭ, precipe, kiam meze en linio subite aperas tia litero de malsama tipo.

En tiu koncerno, estas menciinde, ke nuntempe en Francio — por modernigi la tipografian aspekton — oni ne malofte anstataŭigas la tri literojn é/É, è/È kaj ê/Ê per la sola litero ē/É, kiu surhavas horizontalan streketon, anstataŭ la tri supersignoj france nomitaj »accent aigu«, »accent grave« kaj »accent circonflexe«. Oni efektive ne povas nei ke, dank'al tio, la tipografia aspekto de modernaj francaj presaĵoj estas pli regula (aŭ, se oni preferas: malpli malregula); tial, ĉe francaj presistoj kaj ties klientoj, tiu nova liter-tipo havas jam relative multajn adeptojn.

Simila tendenco ekmontras sin, lastatempe, ankaŭ en Esperanto--presaĵoj. Oni nun vidas aperi la novan, modernan literon ū apud la klasika ŭ; ekzemploj troveblas en »SCIENCA REVUO EN ESPERANTO« $n^{o}$ 69 (pĝ. 7 kaj 8) kaj $n^{o}$ 70 (pĝ. 56 ĝis 62): antaū, kaūzo, aū, anstataūigi, taūgi, aūskultantoj, k.a.

Ĉar, klarvideble, la literbildo de ū aspektas pli eleganta/ol tiu de ŭ, altrudas sin la demando, ĉu tiu principo ne povus esti aplikata ankaū al la kvin aliaj supersigno-havaj Eo-literoj, nome ĉ/Ĉ, ĝ/Ĝ, ĥ/H, ĵ/ĵ kaj ŝ/Ŝ. Se, anstataū cirkumflekso, ili surhavus fajnan horizontalan streketon, la aspekto de tiuj literoj estus pli »glata«, pli agrabla, malpli stranga, do ankaū malpli ŝoka por eksteruloj.

Tio speciale bone videbliĝas en vortoj, kiuj enhavas du aū tri literojn tiajn, ekzemple: ĉirkaŭaĵo ŝarĝĉaro maĉkaûĉuko kaj aliaj. Por ricevi trafan bildon, sufiĉas sinsekve tajpi tiujn vortojn, laū ambaû manieroj.

Estas memkompreneble, ke la ĵus proponita solvo povas esti praktikata nur tiam, kiam la presisto disponas pri la necesaj litertipoj kun supersigno, kaj kiam li bezonas ilin, li tre facile povas mendi ĉe la fabrikisto tiajn kun super-streketo anstataū la samaj kun cirkumflekso.



SCIENCA REVUO, eldono de Internacia Scienca Asocio Esperantista, Vol. 18. n-ro 4 (1967)

342.23 + 347.53

## KRIMINALA KAJ CIVILA KULPOJ

**(Lj. Mihajlov, Sofio, Bulgario)**

Unu el la plej diskutataj kaj disputataj problemoj en la jura literaturo estas la problemo: ĉu ekzistas du specoj de kulpo (kriminala kaj civila) aû ekzistas nur unu kulpo, sed kun du nomoj.

La problemo havas gravan praktikan signifon. Se la kulpo estas nur unu, tiam ne povas en la civila proceso esti agnoskita kiel kulpa tiu, kiu pri la sama ago estas jam en la kriminala proceso agnoskita kiel senkulpa. Kontraûe, se ekzistas kriminala kaj civila kulpoj, tiam povas en la civila proceso esti agnoskita kiel kulpa tiu, kiu pri la sama ago estas jam en la kriminala proceso agnoskita kiel senkulpa ĉar la kriminala proceso okupiĝas pri la kriminala kulpo de la juĝato, dum la civila — pri la civila kulpo.